

# Economix

## 1. Ĝenerala priskribo :

### 1.1. Kio estas Economix ?

Mi skribis tiun programon por mastrumi miajn bankkontojn.

Mi volegis, ke tiu programo ĉefe permesu samtempe :

- . ekkoni la iompostioman saldon de sia konto.
- . laŭvole difini elspezajn kategoriojn facile sumiĝeblajn pomonate.

Tiun programon mi skribis en RealBasic.

La fontprogramo troveblas en mia TTT-ejo :

<http://callix.ĉe.tiscali.fr>

La disdonado de Economix estas libera, kaj rekomendata kondiĉe, ke ĝi estu tute senpage kaj ke tiu ĉi dosiero estu kunsendata kun la programo.

La distribuo pere de paga portilo efektiviĝu ĉiuokaze nur post mia konsento.

La dosieroj, kiujn generas Economix estas ordinaraj tekstaj dosieroj.

Ili legeblas pere de "TextEdit".

La datenoj do facile rekupereblas se okazas problemo.

### 1.2 Dankoj :

Mi dankas ĉiujn, kiuj plimalpli kontribuis al la evoluo de Economix.

Iujn bonŝancajn mi citis en la historio, tamen mi ne forgesas aliajn, kiuj multe alportis dank'al siaj demandoj kaj sugestoj.

### 1.3. Instalado

Por instali Economix-on en vian maŝinon, kopiu la programon Economix sur vian diskon.

Vi povas ĝin ŝovi en antaŭekzistantan dosieron, ĝin meti laŭvole en vian dosieran hierarkion. Krome, mi rekomendas, ke vi lasu tiujn ĉi uzinstrukciojn en la sama dosiero por nenion forgesi se vi kopios Economix-on por amiko.

Vi konstatos, ke pluraj metodoj permesas ekruli ĝin (duoble alklaku la aplikon, dokumenton). Ĉe la uzado rapide aperas, ke malofte utilas alklaki la aplikon mem ĝian dosierujon oni do povas "forgesi" en alian dosieran hierarkion. Vi malofte bezonos malfermi ĝin.

## 2. Malfermo kaj fermo

### 2.1. Nova Dokumento

Komence, surbaze de via lasta banka kontresumo, enigu vian komencan saldon (t.e. : viajn posrestantajn groŝojn!) en la tielnomatan ĉelon, supre kaj dekstre en la fenestro. Poste alklaku la butonon "Akiro" kaj registrigu la operaciojn ankoraŭ ne skribitajn sur via banka kontresumo. Fine registrigu viajn datenojn en dosieron

sur via disko.

## 2.2. Malfermi dokumenton

Vi povas uzi la opcion "Malfermi..." en la menuo "Dosiero", sed vi povas avantaĝe duoble alklaki la dosieron, kiu entenas viajn operaciojn.

Tio ekrulos la aplikon "Economix" kaj malfermos vian dosieron.

Se vi malfermas dosieron malnovan (dumonatan aŭ pli), Economix demandos al vi, ĉu vi deziras enigi la aŭtomatajn operaciojn.

Se vi jesas, Economix enskribos ĉiujn kongruajn aŭtomatajn operaciojn.

Kaze de malnova dosiero, tio povas konstitui multnombrajn liniojn.

## 2.3. La ĉefa fenestro

. Butono "**Printi**" : malfermas la dialogon por printado, same kiel la opcio "Printi..." en la menuo "Dosiero".

. Butono "**Akiro**" : malfermas la fenestron por akiro de nova operacio.

. Butono  $\uparrow$  **Modifo**  $\uparrow^a$  : Ebligas redakti operacion, cele al ties modifo.  
Antaŭe necesas apartigi linion.

. Butono  $\uparrow$  **Forigo**  $\uparrow^a$  : Ebligas forpreni operacio(j)n.  
Antaŭe necesas apartigi linio(j)n.

. Butono  $\uparrow$  **Kontrolmarkado**  $\uparrow^a$  : Markas la kongruantajn linio(j)n cele al ties konsidero en la kalkulo de la banka saldo.  
Antaŭe necesas apartigi linio(j)n.  
Same rezultigos duoble alklaki la linion

. Butono  $\uparrow$  **Serĉo**  $\uparrow^a$  : vidu malsupran §  $\uparrow$  **Serĉo**  $\uparrow^a$ .

. Zono "**komenca saldo**" : enigu vian komencan saldon  
(t.e. : via postrestanta sumo, surbaze de via lasta banka kontresumo).  
Tiun saldon vi enigas nur kiam vi kreas la konton.

. Zono "**Banka saldo**" : tio estas la sumado far Economix, ĝi enkalkulas nur la markitajn operaciojn (do jam registritajn de via banko).  
Tiun saldon vi komparu kun la saldo de via banka kontresumo.

## 2.4. Fermi dokumenton

Vi povas uzi ĉu la opcion "Malfermi..." en la menuo "Dosiero" ĉu la fermbutonon de la fenestro.

Se vi eliras el Economix, la fenestro aŭtomate fermiĝos.

Se viaj datenoj ne estas konservitaj en la disko, tion proponos al vi Economix antaŭ ol fermi la fenestron.

## 2.5. Importi

Tio permesas krei novan konton surbaze de rekupero de operacioj el alia programaro.

La datenoj estu antaŭe aranĝitaj.

Formato Teksto : Ĉiu linio entenu nur unu operacion.

Tabo apartigu ĉiun el la 10 zonoj de ĉiu linio.

Zono N° Longo Nomo Ekzemplo

1 1 Marko 'x' aŭ ' '

2 2 Tago 12

3 2 Monato 8

4 4 Jaro 2006

5 10 Tipo Karto

6 30 aŭ pli Priskribo Supermarkto

7 2 Kodo DO

8 10 Debeto 123,45

9 10 Kredito 0

10 10 Saldo 567,89

Formato .csv : Temas pri formato ĝenerale mastrumata fare de la tabelkalkuliloj kiel OpenOffice. Ĉiu linio entenu nur unu operacion. Tabo apartigu ĉiun el la 10 zonoj de ĉiu linio.

### **3. Konservado de la dokumentoj**

#### **3.1. Konservado, Konservado kiel...**

Permesas registri sur diskon viajn datenojn tiel ke vi retrovos ilin kiam via komputilo restartos.

Konservado kiel... permesas registri viajn datenojn sub nova dosiernomo.

#### **3.2. Aŭtokonservado**

Se vi deziras, ke Economix regule skribu sur diskon viajn datenojn, vi marku la butonon "Aŭtomate konservado, ĉiun 30an sekundon", kiu troviĝas en la Preferoj, sub la ongleto "Diversaĵoj".

#### **3.3. Eksporti**

Permesas pritrakti viajn datenojn per OpenOffice-tipa tabelkalkulilo.

Formato Teksto : Ĉiu linio entenos operacion.  
Tabo apartigos ĉiun el la 10 zonoj de ĉiu linio.

Zono N° Longo Nomo Ekzemplo

1 1 Marko 'x' aŭ ' '

2 2 Tago 12

3 2 Monato 8

4 4 Jaro 2006

5 10 Tipo Karto

6 30 aŭ pli Priskribo Supermarkto

7 2 Kodo DO

8 10 Debeto 123,45

9 10 Kredito 0

10 10 Saldo 567,89

Formato .csv : Temas pri formato ĝenerale mastrumata fare de la tabelkalkuliloj kiel OpenOffice. Ĉiu linio entenu nur unu operacion. La 10 zonoj estas :

Zono N° Longo Nomo Ekzemplo

1 1 Marko 'x' aŭ ' '

2 2 Tago 12

3 2 Monato 8

4 4 Jaro 2006

5 10 Tipo Karto

6 30 aŭ pli Priskribo Supermarkto

7 2 Kodo DO

8 10 Debeto 123,45

9 10 Kredito 0

10 10 Saldo 567,89

#### 4 . Ordonoj por redaktado

La ordonoj "Eltondi, Kopii, Glui" uzeblas en ĉiuj redaktaj zonoj.

Priskribo      Tipo  
                  Kategorio

Vi povas redakti per la klavaro la tagan, monatan kaj jaran numerojn. Por tion fari, selektu per muso la numerojn. Vi povas transiri al la sekvonta zono per la tabklavo.

ĉ ĉeknumeroĉ<sup>a</sup>: tien entajpu la ĉeknumeron, se vi validigas per "Bone", la n-ro konserviĝos.

**Tipo** : Selektu la deziratan tipon en la falmenuo.  
La liston de tipoj vi povas modifi en "Preferoj".

**Priskribo** : Skribu la priskribon aŭ selektu iun inter la operacinomoj antaŭregistritaj en la tiea falmenuo.

Tiu listo modifeblas pere de "Preferoj".

"Priskribo" signifas : la nomon, la klarigon de la elspezo. Ekzemple : Ŝuoj, Supermarktaj aĉetoj, Robo, Restoracio ĉe Remio...

**Kategorio** : Selektu la deziratan kategorion en la falmenuo.  
La liston de la kategorioj oni povas modifii en la Preferoj.

**Debeto kaj Kredito** : Entajpu la respondajn sumojn.

Butono "**Enskribo de la ĉimonataj aŭtomataj operacioj**" : Tiu butono aktivas nur se la hodiaŭa dato situas en la monato, kiu sekvas la lastan enskribon de la aŭtomataj operacioj.

La operacioj estas aŭtomate skribitaj je la monatsanĝo, tamen eblas tion anticipi : necesas plusigi la monaton supre de la fenestro "Akiro" por aktivigi la butonon "Enskribo de la ĉimonataj aŭtomataj operacioj". Tio malebligas plurfojan enskribadon de la aŭtomataj operacioj dum unu monato.

#### 5. La monataj aŭtomataj operacioj

Vi povas postuli de Economix, ke li enskribu ĉiumonate la samajn operaciojn, ekzemple : salajron, repagon, imposton, luprezon, ktp.  
Tiu funkcio atingeblas en la menuo "Elektebloj".

#### 6. La jaraj aŭtomataj operacioj

Koncerne la nemonatajn aŭtomatajn operaciojn, t.e. la duonmonatajn, la kvaronjarajn, jarajn ktp., elekteblas la funkcio "Jaraj aŭtomataj operacioj" en la

menuo "Elektebloj".

Sonon oni povas asocii al la enskribado de la operacio, tio atentigos vin, ke gravan sumon oni debetos, do vi devas konsekvence provizi vian konton.

## **7. Kalkulo de la banka kaj iompostioma saldoj**

Ambaŭ elektoj disponeblas en la menuo "Kalkulo", ili trudas la rekalkulon de la saldoj.

Tio utilas en la okazo se vi konstatas eraron aŭ bizarecon ; nu Economix rekalkulas ek de la listkomenco.

## **8. Statistikoj**

Tiu funkcio atingeblas en la menuo "Kalkulo".

Economix demandas unue la barojn de la esploro kaj vidigas la liston de la elspezaj kategorioj kaj la respondantaj subsumojn.

Se vi selektas linion, la butono "detalo" aktivos, nu ĝi povos montri la detalon de la elspezoj rilate al la selektita kategorio kaj la ekzamenata periodo.

Ankaŭ duobla alklako sur tiu linio, vidiĝos la detalon de la elspezoj.

Kopieblas la listo de la elspezaj kategorioj kaj la respondantaj subsumoj, por tion fari, selektu la deziratajn liniojn, poste la opcion "Kopii" en la menuo "Redaktado". Sekve vi povas glui la tuton en tabelkalkulilon ekzemple.

## **9. Serĉo**

La serĉo efektiviĝas en la listo de operacioj.

Selektu "Serĉi" en la menuo "Redaktado" aŭ premu la butonon "Serĉo" en la ĉefa fenestro.

"Pluserĉi" ebligas transiri al la sekvonta troviĝo.

## **10. Printado**

Se vi deziras, Economix skribos sur paperon viajn datenojn.

Eblas printi aŭ ne printi la kolorajn fonojn laŭ via elekto en "Preferoj" (ongleto ´†diversaĵoj†ª).

Se vi selektas liniaron, la butono "Printi" iĝas "Printi la selektitaron", tio permesas, ke Economix skribu sur paperon nur parton el viaj operacioj.

## **11. Preferoj**

### **11.1. Ongleto ´†Specoj†ª**

La specojn "Ĉeko" kaj "Automata ĝiro" oni ne povas forigi aŭ modifi.

Ili necesas por la bona funkciado de Economix.

### 11.2. Ongleto ´ †Kategorioj†<sup>a</sup>

En la ĉefa fenestro, nur la du unuaj literoj de la kategorio vidiĝas, nu vi devas eviti la uzon de similaj literoj, cele al facile identigi la kategorion.

### 11.3. Ongleto ´ †Operacinomoj†<sup>a</sup>

Vi povas krei operacinomojn kaj kunligi kategorion, specon kaj sumojn kreditajn aŭ debetajn.

Se vi nenion kunligas, Economix elektos la kategorion kaj la specon kurantajn. Koncerne la sumojn, Economix konservos prioritatem la sumon akiritan, prefere al la valoro ligita kun la operacinomo.

### 11.4. Ongleto ´ †Diversaĵoj†<sup>a</sup>

Mi opinias, ke la tekstoj, same kiel la ŝpruchelpiloj, estas sufiĉe eksplicitaj.

### 11.5. Ongleto ´ †Sonefektoj†<sup>a</sup>

Sono povas akompani multajn agojn.

Vi povas ankaŭ ludigi ".mp3"-muzikon, kiam malfermiĝas Economix, por iom gajigi la personan kontadon.

## 12. La aŭtoro

Pli ĝuste mi dirus : "la aŭtoroj", ĉar Economix evoluis dank'al demandoj, konsiloj, bezonoj de multaj personoj.  
Dankon al ĉiuj!

Yannick CALLAUD

ycallaud@bigfoot.com

<http://callix.ĉe.tiscali.fr>

## 13. Kronologio

- 03/08/07 : versio 2.6.0 Aldono de elektebla koloro por la markitaj linioj. Proponis Laurent Michamon. Je la importado de dosiero, tiu-ĉi ne plu anstataŭas la antaŭekzistantajn liniojn, la importata dosiero aldoniĝas post la antaŭekzistantaj linioj. Nun elekteblas la importa kaj eksporta formatoj jene Teksto: tab, tab, return; aŭ .csv. Proponis Guillaume Ballin.